Bulteno de la
Londona Esperanto-Klubo
londona esperanto klubo.com
Majo - Junio 2026

Kluba programo

Majo

1. **Festotago por la unua de majo**, kluboj fermitaj.

8. **Ludvespero** kun helpo de Rico. Ĉeesta kunveno en Highbury.

15. **La "Unuaj" en Esperanto-Muziko** de Thomas Preece.

22. **La lingvo Elefeno - Latinida eleganta kreolaĵo**, parolos Simon Davies.

29. **Ĉesu malfeliĉigi vin! - La arto trovi veran kontenton** de Jürgen Wulff.

Junio

5. **Metro-mapoj, mirinda universo** kun Thierry Spanjaard.

12. **Lingva seminario** gvidata de Anna. Ĉeesta kunveno en Highbury.

19. **Ĉina printempa festo kaj la 12 zodiakoj** de Jianchao YU.

26. **Tegmentoj de Kastelo Greziljono** de Pierre Grollemund.

Esperanto is a neutral, international language, and a global community. Turn to the back page to get started.

Venas somero!

Ofte en la somero, ni kune promenas, ĉu ĉijare? Bedaŭrinde, ĝis nun neniu organizas ĝin, kaj neniu sugestis lokon. Jen granda momento por vi leganto: kien ni iru? Kvankam nun estas tro malfrue por ke ni anoncu ĝin en ĉi tiu bulteno, ni ankoraŭ povas aranĝi. Ni eĉ povas prokrasti ĝin ĝis poste en la jaro, por sperti alian sezonon ekstere, sed mi petas ke oni ne prokrastu donon da viaj sugestoj.

Manko de ideoj restas temo aktuala en la bulteno. Ĉifoje mi mem verkas ĉion, kaj mi havas malklaran vidon pri ĉu oni interesiĝos aŭ ne.

La programo estas pli aktive prilaborita de Rico, kiu nun respondecas pri la organizado. Temoj ĉifoje inkluzivas esperantan muzikon, metro-mapojn, kaj kiel esti feliĉa. Tiuj paroladoj okazos pere de Zoom, aranĝitaj de LEK kaj LVS, la esperanto-klubo de Antverpeno.

Niaj surlokaj eventoj en Londono estas konataj sed ĉiam novigeblaj. En majo ni ludos. De Rico: Estu du (eblaj) ludoj: “Pasis la temp’!” Kaj “Slaloma Konkurso”. La unua estas paroliga kaj instruas ankaŭ pri la E-kulturo, movado, historio ktp; la dua helpas al la aŭdkompreno kaj al la pliriĉigo de la vortstoko. Se homoj ne venos amase jen ni havos la pruvon de la 100%-a frenezeco de la Esperantistoj. La ludojn oni ludu en teamoj, do mi antaŭvidas du teamojn, konkurencon, multe da lernado kaj ridado.

En junio Anna Löwenstein gvidos lingvan seminarion. La temo de tiu estas decidota, do bonvolu diri se vi havas interesan temon, aŭ dubon pri kiel plej bone esprimi ion.

La unuan vendredon de majo ne okazos programero, ĉar tio estas festotago en multaj loko: La tago de la laboro. La unua de majo tradicie estas festotago pri printempo en Eŭropo. En 1889, la internacia kongreso de laboristoj en Parizo decidis ke estu tago de manifestacio por subteni celon de ok-hora labortago. Oni elektis la 1an de majo por memori ĝeneralan strikon en Usono, okazintan inter la 1a kaj 4a de majo de 1886. La manifestacio poste iĝis jara okazo.

Ĝis baldaŭ, Phil Housley



Biero en la sunlumo.

Bieroj, bieraj vortoj, kaj fari aferojn kune

Lastmonate kelkaj el ni kunvenis por diskuti pri bieroj, kaj pri la lingvo de biero kaj bierfarado.

Ni ne nur diskutis bierojn, sed ankaŭ gustumis. Oni povus argumenti ke tio estas la sola maniero por vere kompreni, ĉu ne? La temoj estis historio kaj teĥnikoj de biero, plejparte laŭ eŭropa tradicio sed ankaŭ en Ĉinio, kaj la nomoj uzataj por priskribi specojn kaj stilojn de biero.

Laŭ la esperantista tradicio ni multe diskutis tradukojn, inkluzive de la maloftaj anglaj vortoj kiuj aperas nur en mondo de bierfarado. Pri la angla *wort* (akvo kun eltiraĵoj de malto) ni pensis ke *maltosuko* plej bone kaptas la signifon. Pri *gruit* (miksaĵo de herboj kaj gustigaĵoj, uzata por gustigi kaj konservi bieron, plejparte antaŭ la uzo de lupoloj) ni ne atingis klaran konkludon. Eble oni priskribu per pli ol unu vorto.

La bieroj gustumitaj venis el klasoj *Porter* (nomata pro la ŝato de portistoj), *Hefeweisen* (nomata priskribe pro esti biero de tritiko, nefiltrita do enhavanta giston), kaj *Budweiser* de la urbo *Budweis* aŭ *České Budějovice* en Ĉeĥio. Sed, ĉu tiu lasta estas nomo de stilo, aŭ ĉu speco de *Pilsner*…

Aliaj diskut-temoj estis: la diferenco inter biero kaj elo, kaj ĉu la esperanta uzo de tiuj vortoj similas la uzon en la angla (ale kaj beer); la specoj de gisto kiujn oni uzas por fari diversajn specojn de biero; priskriboj de manieroj de fermentado, kaj ĉu la anglaj terminoj similas vortojn uzataj en aliaj lingvoj. La diskuto estis plaĉe vaste.

Poste, kelkaj uloj pluiris al drinkejo, do evidente la gustumado vekis pli ol plenumis dezirojn.

Oni diskutis pri ĉu ni povos fari ion similan pri aliaj manĝaĵoj. Granda parto de allogeco de surloka kunveno estas eblo vere fari ion kune, ne nur diskuti. Kion ni povos provi poste? Iu sugestis teon, kio certe venas en multaj variaĵoj, kvankam oni devos pensi pri havi ilojn taŭgajn por prepari iom de multaj specoj. Ĉu eble ankaŭ eblas pano, aŭ fromaĝo? Eventuale oni povus aranĝi tutan feston sub preteksto de intelekta scivolo, ĉu ne?

Kompreneble, ni ne limigu niajn ideojn al manĝaĵoj. Kion vi ŝatus fari esperante, kaj kun aliaj esperantistoj? Nia kutima kluba promeno estas unu ekzemplo, kaj mi vere esperas ke ni sukcesos organizi tion iam. Pasintece ekzistis ĥoro de londonaj esperantistoj, supozeble kun tiu sama celo: kunfarado en esperanto. Por mi, tio ne estus tute taŭga, mi verŝajne ne devas klarigi la kialon, sed mi amas la ideon.

Phil

Britaj kongresoj

Ĵus okazis la brita kongreso, en Lestero. Mi esperas ke iu irinte al tio sendos raporton poste.

La sekva kongreso en Britio estas tiu de la Esperanto-Asocio de Skotlando. En 2026 la evento okazos en Glasgovo, je la fino de majo. Tiu informo disponeblas ĉe skotlando.org, kie oni ne trovos multon plian. Ŝajnas ke ili volas ke ĉio estu surpriza. Mi ne povas fuŝi la surprizon, do mi simple enmetas foton de Glasgovo.

Rigardante pli antaŭen, ni aŭdas ke la sekva brita kongreso okazos en ... Francujo! Ĝi okazos de la 14a ĝis la 17a de majo en *Carry-le-rouet* apud Marsejlo, en kuneco kun aliaj e-asocioj.

KER ekzamenoj

Se oni vizitos edukado.net/ekzamenoj/ker, oni trovos eblon registriĝi por la baldaŭaj ker-ekzamenoj. KER estas la esperanta nomo por *CEFR* aŭ *Common European Framework of Reference for Languages*. Tiu estas internacie respektata maniero por taksi nivelon de lingvopovo, uzata en Eŭropo sed ankaŭ aliloke.

Per sukceso en tia ekzameno oni povas atingi pruvon pri sia povo pri Esperanto, tutsamkiel oni povas en aliaj lingvoj.

La sistemo agnoskas nivelojn A1, A2, B1, B2, C1, C2. A1 montras bazan povon, ĝis C2 kio estas por tiuj kiuj ne nur tre kapablas pri la lingvo, sed ankaŭ havas profundan komprenon, eventuale preter la kompreno de denaskaj parolantoj. Nuntempe oni povas interrete provi la ekzamenojn je niveloj B1, B2 kaj C1. La sekva okazo estos en junio, kaj restas tempo por registriĝi.

Ekzamenoj ankaŭ estas oftertotaj ĉe la UK en Graco, inkluzive tiu je nivelo C2.

LA LONDONA ESPERANTO-KLUBO

Lingvaj kvereloj

Mi inventas novan vorton. Mi esperas ke oni plendos pri tio, ĉar tiel estos vortoj por meti en la bultenon.

Mia penso ĉimatene estis pri tio ke en la angla oni povas tre facile komenci frazon sen havi ian ideon pri kiel oni finos ĝin. Oni simple diras la unuan vorton kiu venas al menso, kaj kreos ion gramatikan (aŭ pli-mapli gramatikan) poste. Por fari tion, oni ofte devas uzi pasivajn verbojn, kio estas neplaĉa al esperantistoj kiuj volas paroli simple.

La malavantaĝo en Esperanto estas ke se oni diras unu vorton, kaj post momento decidas ke ĝi estu gramatika objekto, oni devas rekomenci por aldoni la n-finaĵon.

Do mia nova vorto estas "on". Kelkaj esperantistoj jam uzas "na" kiel rolvorteton por indiki akuzativon en vorto ne taŭga. Ekzemple, pri nomoj: "Mi vidas na Tom". "On" similas, sed oni rajtas meti ĝin post vortoj: Se oni forgesis akuzativon, aŭ ne sufiĉe antaŭpensis, oni aldonu "on".

"La granda ulo on mi vidis."

Mi ne diras ĉu mi traktas la ideon serioze, mi preferas ke oni respondu sen scii pri tio.

Rakonteto pri muso

Ĉu vi iam scivolas, kial foje via interreta konekto ne funkcias bone dum momento, kaj tuj refunkciiĝas? En preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj en ĉiuj niaj urboj loĝas malgrandaj bestoj, kaj ili ankaŭ volas uzi la reton. Ili scias ke la dratoj apartenas al la homoj, do ili uzas ilin nur kiam ni ne uzas ilin. Sed foje la bestetoj ne reagas sufiĉe rapide, kaj pasas kelkaj sekundoj ĝis kiam ili rimarkas ke ili devas rekonekti la dratojn al la homaj komputiloj.

Unu vesperon, unu el tiuj bestoj decidis eniri la apartamenton de la homo kies retkonekton ŝi kutime uzas, por danki lin. Tio ŝajnis al ŝi la plej bona agmaniero, kiam ŝi lernis ke la homo devas pagi por la konekto, kaj ŝi uzas ĝin senpage. Do, ŝi silente malsupreniris al truo en la muro de la kuirejo de la homo, kaj trametis sian nazon.

Sed, ve, kiam ŝi faris tion, ŝi aŭdis teruran ekbruegon, kaj ŝi tuj forkuris. Mi scias tiom multe, ĉar, bedaŭrinde, mi estas la homo kiu loĝas en la apartamento. Mi ekvidis etan nazon tra la muro, kaj mi estis tiel surprizita ke mi ekkriis subite, kaj la malgranda besto tuj forkuris.

Se vi legos ĉi tion, eta muso, mi pardonpetas, kaj dankas vin pro via ĝentileco.

Londona Esperanto-Klubo

La Londona Esperanto-Klubo (LEK) estas Esperanto-asocio en Londono (Britujo), kiu zorgas pri la disvastigo de Esperanto en Londono kaj organizas kulturan vivon por la komunumo parolanta Esperanton en Londono kaj ĉirkaŭe.

Lokoj kaj horaroj

LEK kutime kunvenas vendrede vespere. Kunvenoj je dua vendredo de monato estas surlokaj kaj okazas en nia kunvenejo en Highbury. Kunvenoj komenciĝas je 19.15h. Aliaj surlokaj kunvenoj okazas de tempo al tempo - por scii pli pri tiuj, bv. viziti la paĝon de eventoj ĉe nia retejo. La ceteraj vendredaj kunvenoj okazas kutime en la interreto per la apo Zoom, kun komenc-horo je la 19a. Ĉiuj klubanoj kaj vizitantoj, proksimaj kaj foraj, do havas eblon partopreni en la kluba vivo.

Novaj spektuntoj de la interretaj kunvenoj povas peti ligilon al sekva Zoom-renkontiĝo en tiu ĉi paĝo: londonaesperantoklubo.com/zoom.

Nia kunvenejo

La kunvenejo troviĝas ĉe:

Highbury View
89 Ronalds Road
London
N5 1XQ

La ejo estas facile atingebla de la metrostacio Highbury & Islington. Temas pri pli-malpli 10-minuta piedirado. Atentu, ke **por eniri la ejon, oni bezonas enirkodon**. Se vi ne konas ĝin kaj intencas ĉeesti, bv. kontakti nin per la kontakto-paĝo en nia retejo por havi la kodon.

Por ĝisdata informo pri kiel atingi Highbury View, oni povas konsulti la retejon de TFL ĉe tfl.gov.uk/plan-a-journey.

Kontaktu nin

LEK retejo

Telegramo

Esperanto?

Esperanto is a "bridge" between different language communities, and a global community in itself - there are Esperanto speakers on all continents, who support and learn from each other. Because it does not belong to any country, it is equal and neutral.

Esperanto was created by taking common features from existing languages, and uniting them with consistent rules that allow a small set of words to provide a lot of expression. It was designed to be easy to learn, but capable of expressing any idea. Compared to other languages, you can be fluent in Esperanto with much less study.

Here is the first article of the *Universal Declaration of Human Rights*, in English and in Esperanto, both from the UN's official translations.

Article 1 All human beings are born free and equal in dignity and rights. They are endowed with reason and conscience and should act towards one another in a spirit of brotherhood.

Artikolo 1 Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus konduti unu al alia en spirito de frateco.

Some quick facts:

- You will always know the type of any Esperanto word from its ending. If you want to use a word as a different type (e.g. turn a noun into an adjective) you can just change the ending.
- A word's core meaning never changes. Once you learn a word, you will always know what it means. Many words are built from other words - and if you need a word that doesn't exist, you can make it.
- If you want to learn about grammar, Esperanto will make it easy. But if you don't want to, you don't need to. Everything in the language means something, nothing is there just for grammatical reasons.

To start learning now, here's a website which will give you a tour of the language very quickly, and then offer some ideas about how to continue. One of the best ways is by joining the courses given by the London Esperanto Club.

unua.leciono.org

Se vi volas kontribui ion al la Bulteno, bonvolu kontakti Phil aŭ la klubon. Troviĝas formularo ĉe la kluba retejo se vi ne scias kontaktdetalojn.